

BELGA ESPERANTO-FEDERACIO



# Sonorilo

55-a jaro - n° 5  
novembro - decembro 1963

Demandu provveturon per  
la nova

# Ford Anglia

LA PLEJ BRILA EN SIA KATEGORIO



rekta distribuanto por Brugge kaj  
ĉirkaŭaĵoj

## GARAGE CANADA

GULDEN VLIESLAAN 68 BRUGGE

TEL. 34611

# Sonorilo


oficiala dumonata bulteno de B.E.F.

Redakcio : jaumotte maurice  
roose fernand, sint-klaradreef 59, brugge tel. (050) 319.81  
maertens grégoire  
poupeye charles

kunlaborantoj al regulaj rubrikoj :

Dr. pol denoël  
bruno denoël  
ISCRUTANT ROGER  
DE CUYPER GEORGES  
DE MARRÉ LUC

ADMINISTRADO : TERRYN J. RAAPSTRAAT, 72 GENT



ASOCIO SEN PROFITA CELO

SIDEJO & PREZIDANTEJO

DEBRUYNLAAN 44, WILRIJK TEL. (03) 377758

poŝtkonto de B.E.F. : 1634.34 RAAPSTRAAT, 72, GENT

KOTIZOJ POR LA 49-A KONGRESO DE ESPERANTO  
DEN HAAG - 1-8 AUG. 1964

	Gis	Gis	Post
Kongreskotizoj	31-12-63	31-3-64	31-3-64
Kongresano	630 F	700 F	770 F
Edz(in)o de kongresano	315 F	350 F	385 F
Junul(in)o ne pli ol 20 j.	238 F	266 F	294 F
Universitata student(in)o de 20 ĝis 30 jara	392 F	434 F	476 F
Blindul(in)o	315 F	350 F	385 F
Individuaj membroj de UEA (ricevas minimume la jarlibron)			
Kongresano	560 F	630 F	700 F
Edz(in)o	280 F	315 F	350 F

Pagebla al P.K. 2368.04 de Sino J. Plyson  
Pl. Eug. Flagey, 23 - Bruselo 5

al la leganto kiuj ne estas MA de u.e.a.

Inter vi certe estas multaj, kiuj intencas viziti la Universalan Kongreson en Hago, en aŭgusto de la sekvonta jaro. Mi speciale direktas min al ili, kun la propono nun fariĝi membro-abonanto (MA) de Universala Esperanto-Asocio. Ekzistas diversaj avantaĝoj nun decidi al tio, ĉar:

- a) kiel MA vi havos rabaton de 5,— guldenoj je la kongreskotizo kaj se via edzino (edzo) ankaŭ aliĝos — je duona kongreskotizo — ŝi (li) krome havos rabaton de 2,50 guldenoj. Entute do rabato de 7,50 guldenoj;
- b) kiel MA por 1964 vi ek de la kotizpago ricevos la monatan revuon « Esperanto » kaj per ĝi vi ĉiam estas ĝisdate, rekte kaj plene informita pri la laboro de U.E.A. kaj ĝiaj aliĝintaj kaj kunlaborantaj asocioj;
- c) kiel MA vi ricevos en printempo 1964 la unuan parton de la jarlibro kaj en ĝi vi trovos ĉiujn informojn pri la Esperanto movado en la tuta mondo (la duan parton de la jarlibro vi ricevos en aŭtuno 1964);
- d) per via aliĝo vi stimulas la komitatanojn, estraranojn kaj geoficistojn de U.E.A. en iliaj laboroj por nia komuna ideo.

La kotizo por MA estas 270 Belg. frankoj. Vi povas sendi la monon pere de la landa ĉefdelegito (peranto) aŭ rekte al Universala Esperanto-Asocio: poŝtĉekkonto 37.89.64 Rotterdam aŭ konto ĉe la banko « Mees & Zonen » Rotterdam. Mi aldonu ke vi per via aliĝo por 1964 nur devigas vin por tiu jaro, se vi — je mia bedaŭro — ne ŝatus resti MA en estontaj jaroj, vi simple ne plu pagu la kotizon.

E.J. Woessink, estarano pri financoj de U.E.A.

P.S. Se vi, kiu legas tion ĉi, bedaŭrinde por vi kaj por U.E.A., ne povus veni al la kongreso en Hago, vi kompreneble tamen estos kore bonvena kiel MA de U.E.A. Nur per internacia komuna laboro ni povas atingi nian celon.

E. J. W.

#### REZULTO DE LA BALON-RALIO EN ANTVERPENO DUM LA BENELUKSA KONGRESO

Pluraj kartoj fiksita al la balonoj revenis el diversaj partoj de nia lando (precipe de la marbordo), el Nederlando kaj ankaŭ el Anglujo. Tie kie oni komence atendis kompeticion inter diversaj estraranoj de BEF finfine montriĝis tute neatendita konkludo. Estrarano ja gajnis, sed estis estrarano de la LKK, nia nederlanda S-ano S-ro Schippers, Prez. de LEEN. Efektive lia balono alvenis en Anglujo, en Ashford (malgranda vilaĝo en Kent). Oni bezonis la helpon de S-ro Norman H. Smith el Dover, delegito de UEA, por koni la plej grandan distancon. Intertempe S-ro Schippers jam ricevis sian premion. Al ĉiuj resendintoj de la balonkartoj la LKK sendis premiojn en formo de propaganda materialo.

«ankaŭ ni vivos en kastelo»

16-, 17- kaj 18-an de majo 1964

en Lieĝo (Wégimont)

Post riĉa vico de sukcesplenaj Beneluksaj Kongresoj, okazos dum Pentekosto 1964 en Lieĝo la 1-a kongreso de nia Federacio. La sukceso de nia UNUA estos favora aŭguro por la estontaj BEF-kongresoj.

**LA KONGRESEJO** — En pluraj landoj oni prave fanfaronas pri kasteloj kiel kunvenejoj por Esperantistoj. Dum la proksimjara kongreso, **ankaŭ ni vivos en kastelo!**

La administracio de provinco Lieĝo metas je nia dispono la belan Kastelon de Wégimont kun ĝiaj turistaj instalaĵoj. La bieno situas 15 kilometrojn en la apudeco de Lieĝo, sur la altebenaĵo de Herve.

La historia kastelo, lokita en mirinda pejzaĝo, estas interne tute modernigita. Grandega parko, lageto, naĝejo ĝojigos la kongresanojn kaj iliajn familianojn.

Ĉiuj kongresaj aranĝoj okazos en la bieno: kunsidoj, diservo, distraĵoj, bankedo, plena gastigado de la kongresanoj, eĉ ekskursetoj en la parko, ĉio okazos en la kongresejo!

**KONGRESKOTIZO** — Kiel por la antaŭa kongreso, la kongreskotizo estas fiksita je 100 F. — La kromaj familianoj povos aliĝi pagante nur F 75. Ankaŭ junuloj malpli ol 21-jaraj kaj studentoj pagos F 75.

Ekde fino de marto 1964 (t.e. dum la lasta monato antaŭ la kongreso) la kotizoj iĝos respektive F 140 kaj F 105.

**ĈAMBROZERVIGO** — Multaj kongresanoj povos loĝi en la kastelo mem, en komfortaj ĉambroj por 1 aŭ 2 personoj, kun bonaj litoj. Krome estas ebleco, dormi en komunaj dormejoj.

Povas esti ke la nombro de la disponeblaj ĉambroj ne sufiĉos por loĝigi ĉiujn kongresanojn. Oni do plej frue aliĝu — almenaŭ **ONI TUJ REZERVU SIAN ĈAMBRON!**

#### SPECIALAJ KONDIĈOJ —

1-persona ĉambro	:	F 80 (ponokte)
2-persona ĉambro	:	F 100 (ponokte)
komuna dormejo	:	F 40 (ponokte)
matenmanĝo	:	F 20
tag- aŭ vespermanĝo (menuo)	:	F 55

**EBLECOJ** — Oni povas eventuale pli malmultekoste manĝi laŭ la prezoj « à la carte ». Oni ankaŭ povas elekti pensionan prezon: 145 F (plena pensiono).

Bankedo (bonega manĝo, inkluz. de servmono kaj 1/3 de botelo da vino): F 140

**SENPAĜAJ** por kongresanoj estas: enirprezo, aŭtomobila parkado, ĝuado de ĉiuj distraĵoj (naĝejo, remado, fiŝkaptado ktp.)

La relative malalta prezo de loĝado, manĝoj, trinkaĵoj, ktp. tute ne signifas ke ankaŭ la kvalito estas malalta. Tiuj kondiĉoj estas eblaj, ĉar la bonfaro de la provinca administracio metas tiun kastelon kaj ĝiajn turistajn instalaĵojn je la dispo de la popolo, sen profita celo!

**EKSKURSO** — Tuttaga ekskurso de lundo: aŭtoĉare, 140 km. Vizito de Lieĝo - Spa - Francorchamps - Stavelot - Tagmanĝo en Trois-Ponts - Chevron (mineralakva farejo) - Remouchamps (grotoj) - Ambleva valo.

**PREZO** (inskluzive de tagmanĝo, vizito de la grotoj): F 150

La L.K.K. —

D-ro Pol Denoël	prezidanto
S-ino Jeanne Grisard	viceprezidantino
S-ro Maurice Dengis	sekretario
S-ro Jean Pirard	redaktoro
S-ino Dela Denoël	kasistino
S-ro André Coppe	gazetara sekretario
S-ro Marcel Lemme	loĝiga servo
S-ro Alphonse Kuster	loĝiga servo
S-ro Henri Dujardin	festorganizanto
S-ro Serge Denoël	junularaj aferoj
F-ino Elza Champy	membro
S-ino Elise Dujardin	membro
S-ino Germaine Kuster	membro
S-ro Mathieu Guyot	membro

### PROVIZORA PROGRAMO

#### Sabaton, la 16-an de majo

Ekde tagmezo: instaligo en Wégimont (apud Soumagne).  
Posttagmeze: akcepto de kongresanoj en urbodomo de Lieĝo.  
Kunsido de B.E.F. kaj B.E.J.A. en Wégimont. **Oficiala malfermo.**  
Amuza kultura vespero (kinó, teatro, kantoj, muziko, senpaga loterio, balo).

#### Dimanĉon, la 17-an de majo

Diservo en la kastela preĝejo.  
Solena kunsido por jubileo de Lieĝa Grupo (60-jara).  
Saluto de invititaj oficialaj reprezentantoj. (provinco, ktp.)  
Komuna fotografado sur la kastela teraso.  
Posttagmeze: promenadoj en la bona parko  
ludoj (remadoj, fiŝado, naĝado, ktp.)  
kolektiva promeno en la apuda regiono  
vizito al konata preĝejo  
se tro malfavora vetero: distraĵoj, teatraĵoj.  
Depono de floroj sur la tombo de Joseph Soyeur en Seraing (fare de kongresa delegacio).  
Vespere: Lasta kunsido de kongresanoj  
BANKEDO Balo.

#### Lundon, la 18-an de majo

Tuttaga ekskurso al la AMBLEVA VALO (en kunlaboro kun la « Syndicat d'initiative de la Vallée de l'Amblève »).  
Adiaŭo en Lieĝo.

## Alproksimiĝas ZAMENHOFTAGO

Depost jardekoj la esperantistoj havas la bonan kutimon aĉeti libron la 15an de decembro, je la tago de la naskiĝo de la majstro. Esperanto-libron, kompreneble! Heu... kiom da esperantistoj havas tiun bonan kutimon? Tial ni volas foje rememorigi tion por tiuj kiuj eble forgesis... aŭ neniam konis. Se kelkaj inter vi eble ne bone scias kiun libron elekti, «...mi ne ŝatas poezion...»... «...mi neniam legas romanojn...»... «...mi vere ne havas tempon por legi...» (la ĝusta interpretado de tiu diro estas: ĉio alia pasas antaŭ la legado), tiam mi volas helpi. Ekzistas libro kiu absolute devas kontentigi, interesi kaj plaĉi al ĈIU esperantisto kiu meritas tiun nomon. Ĝi estas la biografio pri la majstro. Ekzistis bela tia libro de Dr. Edmond Privat. Mi foje mi aŭdis ke en siaj lastaj vivojaroj Dr. Privat iom hontis pri tiu libro. Mi demandas al mi kial? Mi tre ŝatis lian nekomplikan, bone kompreneblan, fortikan prozon. La skribmaniero estas nun iom malnovmoda; efektive. Sed antaŭ 30 jaroj preskaŭ ĉiuj ŝatis tiun skribmanieron. Sed intervenis io alia, pli grava. Nome ke la libro malaktualiĝis. Depost la apero, malkovriĝis liom da faktoj, ke nova verko iĝis neceso. Tion faris Marjorie Boulton. Se iu estis la kvalifikita persono por entrepreni tian verkon, tiam certe la Angla lektorino kaj majstra poetino. Ĝi havas 265 paĝojn, havas indokson (feliĉe!) kaj estas eldonita de « Stafeto », kio ga-

rantias belan kaj modernan aspekton. Tre multaj interesaj fotoj ilustras ĝin. Io kio faras la libron ankoraŭ pli interesa, estas ke ĝi prezentas ankaŭ la historion de la esperanto-movado en ĝia komenca periodo. Tio estas grandparte la sekvo de la fakto ke la vivo de Z. ne estis sensacia aŭ aventuroplena. Relative malmulte oni povas rakonti pri lia vivo. Kaj due, la esperanto-afero akaparitis lin tiom ke la du estas ne-separeble ligitaj.

Tie-ĉi sekvas nun du citaĵoj el tiu admirinda libro.

1) La deveno de la Homaranismo.

Estas konate ke Zamenhof opiniis ke ne nur la diverslingveco kaŭzis la malamikecon inter la popoloj; sed ankaŭ la diversaj religioj. Tial li volis krei novan neŭtralan lingvon. Kaj li volis ankaŭ krei novan neŭtralan religion. Forte inspiritis lin en tio la Hebrea religio Hilel. Tial ĝi estis unuc nomita Hilelismo: kaj poste iom ŝanĝita « Homaranismo ». Tiu projekto estis ne nur cerba produktaĵo, de el la studoĉambro, aŭ de el la « ebura turo », for de la reala ĉiutaga vivo.

Kiel M. Boulton klare montras, estas la vivo mem kiu altrudis al li tiujn pensojn kaj planon.

Paĝoj 131-132 «...Zamenhof » denove suferis pro novaĵoj el » Bjalistoko: terura pogromo » okazis tie.

»...Tri tagojn antaŭ la pogromo, iu murdis la polices-tron en Bjalistoko. Lia nomo » estis Dergatčov kaj oni ĝene-

» rale estimis lin kiel adminis-  
 » tranton justan kaj boninten-  
 » can. Kiam la judoj petis per-  
 » meson meti florkronon sur  
 » lian tombon, la respondo es-  
 » tis: Vi ricevos respondon  
 » jaŭde; jaŭde estis la festo de  
 » la korpo de Kristo. Kvankam  
 » la ortodoksa eklezio ne havas  
 » tiun feston, katolika procesio  
 » renkontis ortodoksan proce-  
 » sion; iu pafis kontraŭ la or-  
 » todoksuloj; la policanoj ko-  
 » mencis krii: Mortu la judoj;  
 » kaj masakro komenciĝis. Ŝaj-  
 » nas ke la tuta abomena afero  
 » estis antaŭaranĝita.

» La kulpuloj estis la polica-  
 » noj, kelkaj soldatoj, lokaj  
 » krimuloj kaj sentaŭguloj, kaj  
 » kelkaj kanajloj, kiujn oni ver-  
 » ŝajne venigis speciale. Tiuj  
 » trakuris la stratojn de Bjalis-  
 » toko, kun hakiloj kaj feraj  
 » stangoj; enrompis domojn,  
 » murdis aŭ kripligis multajn  
 » senkulpajn judojn. Poste, en  
 » tiuj hejmoj ili detruis ĉion  
 » detruieblan: meblojn, vestojn,  
 » mastrumilojn; eĉ forŝiris  
 » murpaperon de la muroj. Ju-  
 » nulino vidis la dudekjaran  
 » kaj dudekunujaran fratojn  
 » murdataj kune kun dektrija-  
 » ra fratino. Multaj judoj de  
 » ambaŭ seksoj kaj ĉiuj aĝoj  
 » tiuokaze perdis la okulojn....  
 » ...oni portis multajn el la plej  
 » grave vunditaj viktimoj al la  
 » Hebrea hospitalo en Varso-  
 » vio. Zamenhof preskaŭ certe  
 » aŭdis multajn detalojn de  
 » siaj kolegoj; eble tiuj-ĉi eĉ  
 » vokis la okuliston de Dzika  
 » strato por helpi dum tiu inun-  
 » do de blindigitoj.... Homara-  
 » nismo ne estis ia kabineta  
 » ekzerco en morala filozofio:  
 » el tiaj aferoj ĝi fontis.»

2) Zamenhof vivis en la Ro-  
 mantisma periodo.

La sekvanta parto de la bio-  
 grafio povus veni rekte el 19jar-  
 centa romantika dramo aŭ ro-  
 mano. Per tiu aserto ni neniel  
 volas eldiri juĝon! Dum la 4a  
 ĝenerala kunveno en la tria uni-  
 versala kunveno en Genevo, de  
 Beaufront diris ke li iris al la  
 konata filozofo Ernest Naville:  
 (p. 143) « Mi portis al li la sa-  
 » lutojn de nia Majstro, de la  
 » Kongresa Komitato, de vi  
 » ĉiuj, kun miaj propraj.... Fin-  
 » fine, petante ke mi transdonu  
 » al la Kongreso liajn salutojn,  
 » li diris kiam mi estis foriron-  
 » ta: Nun ni interkisu frate,  
 » kaj dufoje kisis min. Ĉar mi  
 » ne povas gardi tiun duoblan  
 » kison por mi mem, mi plej  
 » respekteme petas nian karan  
 » Majstron, ke li permesu ke  
 » mi ĝin transdonu al li kaj  
 » pere de li al ĉiuj esperantis-  
 » toj. Li ĉirkaŭbrakis Zamen-  
 » hof, kisis lin, longe tenis lin  
 » al sia brusto, poste falis en  
 » seĝon, la manon sur la koro,  
 » kvazaŭ tro da emocio premus  
 » lin. Sekvis granda ovacio,  
 » kun krioj de Vivu Zamen-  
 » hof! Vivu de Beaufront! Be-  
 » lega repaciĝo post eta mis-  
 » kompreno....?»

» Nur kelkaj en la salonego  
 » staris sufiĉe proksime al Car-  
 » lo Bourlet por aŭdi la solan  
 » vorton, kiu tiumomente falis  
 » mallaŭte el liaj lipoj: Ju-  
 » daso....

» Iom poste Naville aŭdis  
 » pri la epizodo kaj diris ke li  
 » neniam kisis de Beaufront!!»

Kara leganto; tiu libro de  
 M. Boulton estas ne nur inte-  
 resega sed ĝi estas multloke  
 kapta kiel romano!

## La 48a Universala Kongreso de Esperanto en Sofia

### Jaŭdo 8a de aŭg.

Kiel jam tradicie, tiu tago estas la tago de la ekskursoj.  
 Kvar tiaj estis organizitaj. Unu al la Rila-montaro. Pli ol 600 partoprenis. La montaro, kiel multaj en la Balkano, estas imponega. Sed plej imponas la tiea monaĥejo, kiu antaŭ nelonge estis akapardinare pitoreska kaj la internaj riĉaĵoj estas neimageblaj. Ni, kiuj partoprenis, neniam kapablos forgesi la en la mezo starantan preĝejon, ĝiajn murpentraĵojn (kiuj ofte pensigas pri niaj Breughel kaj Jeroen Bosch!) kaj multegajn juvelajn krucojn, kalikojn, religiajn vestaĵojn. Kaj ni pensis ankaŭ: tiom da riĉaĵoj (de kiuj neniu profitis) samtempe kun la ekstera mizerego ĉe la tiutempa popolo. Kontrasto! Sed, ne racia realo! La ekskurso al la Vituŝa montaro ne nur admirigis nin denove kolosan montaron, sed donis eblecon admiri tiun geografian miraklaĵon kiu estas la « oraj pontoj ». De en restoracio sur tiu montaro ni havas ravan vidon sur Sofio. Estis ankaŭ ekskurso al la klimata ripozloko Boroveĉ kaj alia al groto Ledenika por la amatoroj de speleologio. Okazis ankaŭ ĉiutagaj ekskursoj en la ĉefurbo mem.

### Vendredo 9a de aŭg.

La komitato de UEA kunvenis; la Cseh-seminario okazis; kaj en la kadro de ISU paroladis s-ano Boris Kolker pri la permaŝina tradukado el la Rusa lingvo en esperanton. Tiu parolado ne povas esti priparolita tie-ĉi; ĝi devus aperi kune kun la aliaj en broŝuro. Okazis ankaŭ dua ĝenerala kunveno de UEA kaj publika prezentado de la infana kongreso. Tie partoprenis 62 infanoj de 10 nacioj. La publika prezentado estis interrompita pro pluvego kaj devis daŭrigi en salono kiu ne povis enteni ĉiujn vizitintojn! Bedaŭrinde, ĉar la programo estis simpatika.

Antaŭvespere la Internacia Arta Teatro prezentis libervole (kaj do kontraŭ enirpago) « Hanibalo » de V. Kjaloviĉ kaj « Sen Eliro » de J.P. Sartre en traduko de Roger Bernard (kiun mi supozas esti granda admiranto de la Franca ekzistencialisto). Mi demandas al mi kial tiu trupo prezentis en kadro de kongresoj jam trifoje la samajn verkojn, se ĝi, « libervole » prezentas aliajn verkojn unufoje? La kapablo de tiu trupo estas jam sufiĉe emfazita. Atentinda fakto, de plej granda graveco, estas ke antaŭe ni devis alvoki geaktorojn de ekster la esperantista mondo, kaj ke ni nun diaponas pri tre altnivelaj esperantistaj trupoj.

La Internacia Arta Vespero en la Universiado, estis tre bela. Kelkaj ĥordancoj estis ravegaj; same la kanthoroj el Polujo kaj Italujo. Ni ankaŭ ne forgesos la du Japanojn. La Ruso N. Rytjkov estas bonega deklamisto kaj la Zagreba F. Konjahodziĉ estas mimikisto preskaŭ nekomparebla. Juna Hungaro prezentis sorĉojn tre amuzajn. Mi, persone, malpli ŝatas la solkantojn.

### Sabato 10a de aŭg.

Mirinde multaj estis ankoraŭ restintaj en Sofio por ĉeesti la solenan fermon. La kutimaj raportoj, dankesprimoj. Poste la ĉiam kortuŝa momento de la transdono de la kongresa flago al tiuj kiuj organizos la venontan kongreson (tie-ĉi al s-ino Kervers por Den Haag).

### Finaj rimarkoj.

Ni scias ke tiu raporto estas multe tro mallonga; kaj ke ĝi ne kapablas reliefigi ĉiujn belaĵojn de la kongreso. Ni multon ne ankoraŭ menciis. Eĉ nur doni la liston de la fakkunvenoj estus tro longe por la spaco pri kiu ni disponas. Sufiĉas diri ke kiel kutime, juristoj, kuracistoj, katolikoj, U. Liganoj, protestantoj, geografoj, fervojistoj ktp. ktp. kunvenis. Kaj multegaj detaloj restas. Unu ekzemplo nur: la tre intima, sentoplana Sankta Meso de la katolikoj en tiu eta preĝejo; kun tiu prediko de juna Hungara pastro.

Fine. Kio, esence kaj finfine, kongreso devas esti? La respondon donis Zamenhof: « ekzercanta kaj edukanta antaŭparolo por la historio de la estonta interfratigita homaro » (M. Boulton « Zamenhof »; eld. de Stafeto p. 177).

La kongreso de Sofio plenumis tion plene.

Partopreninto.

## FIRMA VAN ISEGHEM & VERSTRAETEN

P. V. B. A.

St.-Bernardse steenweg 631  
Hoboken

Vitraloj - Speguloj -  
„securit“ vitro  
kolorigitaj vitroj  
aluminiaj senmastikaj  
stangoj por kupoloj

Vitro cementoj por  
tutvitra-konstruaĵoj  
mastiko  
telefono 37.88.20

### VINTRAJ FERIAJ SEMAJNOJ EN AŬSTRUJO

La unua okazos de 26 dec. ĝis 1 jan. '64 en Edlach apud Payerbach - Reichenau: ripozo kaj skisporto. Ekskursoj i.a. al Vieno.

La dua komenciĝos tuj post la unua de la 1a de jan. ĝis la 4a kaj ĝi okazos en Vieno mem. Sur la alloga programo staras vizitoj i.a. al la fama kastelo de Schönbrunn; al la egale fama esperanto-biblioteko en la Nacia muzeo.

Ni tre rekomendas. Interesigantoj demandu tuj kondiĉojn al: Aŭstria Esperantista Federacio Fünfhausg. 16 Wien 15.

Bijvoegsel aan nummer 5 van "Sonorile"



# Aliĝilo

## 49-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Den Haag-Nederlando

Konstanta adreso: U.E.A., Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.  
Banko: Mees & Zoonen, Rotterdam.

Poŝtekkonto je la nomo de U.E.A.: 37 89 64.

Klara skribo estas grava helpo por la administracio.

Aliĝiloj ne klare skribitaj restos netraktitaj.

Mi aliĝas al la kongreso laŭ la kondiĉoj sur la dorsa flanko kaj laŭ la jena specifo sendas la pagon kune kun la aliĝilo al:

Kotizo . . . . .  
Literatura Kaso . . . . .  
Blindula Kaso . . . . .  
Adopta Kaso . . . . .  
Adoptaj Gepatroj . . . . .  
(n.gld. 30)  
Kredito . . . . .  
Entute . . . . .

Familia Nomo, S-ro, S-ino, F-ino (nepre forstreku du) . . . . .

Antaŭnomo . . . . .

Strato kaj numero . . . . .

Urbo (en nacia lingvo) . . . . .

Provinco (se necesas por la poŝto) . . . . .

Lando (en Esperanto) . . . . .

Profesio (en Esperanto - Nur por statistiko) . . . . .

Naskiĝojaro (Nur por statistiko - La informo restas konfidenca), . . . . .

Antaŭnomo de edz(in)o, kiu aliĝas samtempe (laŭ aldonita aparta aliĝilo) . . . . .

Dato de tiu ĉi aliĝilo . . . . . Subskribo . . . . .

Por uzo de la administracio

Pago ricevita	Kongreskarto sendita	Statistikita	2-a Bulteno sendita	K.L. sendita
---------------	----------------------	--------------	---------------------	--------------

KONGRESKOTIZOJ	Gts 31.12.63 n.gld. stel.	Gts 31.3.64 n.gld. stel.	Post 31.3.64 n.gld. stel.
Kongresano	45.— 180.—	50.— 200.—	55.— 220.—
Edz(in)o de kongresano	22,50 90.—	25.— 100.—	27,50 110.—
Junul(in)o ne pli ol 20-jara	17.— 68.—	19.— 76.—	21.— 84.—
Universitata Student(in)o de 20 ĝis 30-jara	28.— 112.—	31.— 124.—	34.— 136.—
Blindul(in)o	22,50 90.—	25.— 100.—	27,50 110.—

(La Kurztabelo de la stelo troviĝas en la Jarlibro de U.E.A.)

**Rabatoj:** Plenaĝaj aliĝintoj, kiuj estas individuaj membroj de U.E.A. (t.e. ricevas minimume la Jarlibron) rajtas rabaton de 5 ned. gld. Edz(in)o de membro rajtas rabaton de duono de tiu sumo. La rabato ne validas por aliaj familianoj, ĝejnuloj, studentoj, blinduloj kaj kiu ajn alia kategorio de kongresanoj.

**Studentoj:** La speciala tarifo por studentoj rilatas nur al universitataj studentoj kaj ĝi validas nur se kun la aliĝilo troviĝas atesto de ilia fakultato.

**Blinduloj:** La speciala tarifo por blinduloj kaj iliaj gvidantoj validas nur se kun la aliĝilo troviĝas atesto de okulkuracisto aŭ blindulorganizaĵo. Gvidanto de blindulo rajtas ne pagi la kotizon.

**INSTRUKCIOJ** pri aliĝo al la 49-a Universala Kongreso de Esperanto:

1. Ĉiu partoprenonto devas **nepre** plenigi apartan aliĝilon. Se oni ne havas aliĝilon, uzu samformatan paperon.
2. Donu ĉiujn petitajn detalojn. Skribu klare, tajpe aŭ preslitere. Aliĝiloj ne klare skribitaj restos netraktitaj.
3. Sendu la aliĝilon kaj la pagon rekte al U.E.A. aŭ al landa peranto.
4. Pagu nepre al la sama instanco al kiu vi sendas la aliĝilon.
5. Aliĝilo estos traktita nur post ricevo de la pago.
6. La kongreskotizo ne estas repagebla, eĉ se la aliĝinto ne partoprenos la kongreson.
7. Se oni deziras sendi kun la aliĝkotizo monon por sia kredito ĉe la Kongreso oni povas tion noti sur la aliĝilo.
8. Pagante por alia persono nepre klare sciigu la celon de la pago kaj skribu la kompletan adreson.
9. Kongresan karton oni ne rajtas fordoni, vendi aŭ interŝanĝi.

# NIA KARAVANO AL LA 48-a KONGRESO

La suno jam brilis, frue kaj arde, tiun mardon la 30an de julio, kiam ni alpaŝis al nia bela, ŝajne fortika aŭtobuso kiu portos nin al la lando de la rozoj. Ĉio glate iris en tiu unua tago. Je diversaj lokoj envenis la karavanoj Flandraj, Valonaj, Francaj kaj Britaj. En la antaŭvespero ni jam estis en Heidelberg kaj laŭlonge de la romantika Neckarvalo. Sed en Bad Wimpfen trafis nin unuafoje la malbona sorto. F-no Champy ekhavis krummalaraĝon tian ke ni ne povis riski lasi ŝin daŭrigi. Kuracista konsilo estis decida. La Germanaj aŭtovojoj estas modelaj. Rapide, la postan tagon, ni estis en Ulm; vidis la plej altan preĝejan turon; aĉetis multajn fruktojn kaj vizitis la malnovan urbkvartalon tre rimarkindan, sub kompetenta gvidado de loka samideano kiu atendis nin laŭlonge de la aŭtovojo. Tra tiu urbo fluas la Danubo kiu apartigas la loĝantojn ne nur en du administracie diversaj urboj (Ulm kaj Neu-Ulm) sed ankaŭ en du landoj: Bavario kaj Würtemberg. Vespere ni estis en Aŭstrujo, en Zell-am-See. Ni manĝis kaj loĝis en belega, pitoreska hotelo. Sed la 3a tago alportis la duan malagrablaĵon: difektiĝo de la aŭto. Ni devis atendi ĝis la 16.40 h. antaŭ ol ni povis foriri kaj tiam devis ankoraŭ atingi Ljubljana; post transiro de la Hoch Alpenstrasse! Tiun lastan ni ankoraŭ vidis en la taglumo. Unika travivaĵo sur tiu altega vojo, meze en la plej imageble sovaĝa montarnaturo. Vespere ni alvenis al Italujo, kiun ni devis tra tre mallonga distanco trairi. La doganoficisto montriĝis vera sudulo kun la daŭraj laŭtaj paroloj kaj ŝercoj! Fine de tiu Itala terpeco ni rimarkis du vojmontrilojn; unu al Jugo-Slavujo kaj unu al Aŭstrujo. Ni kompreneble iris laŭ indiko de la unua, kaj tio estis la eraro! Tiel ni ne venis sur la granda vojo al Ljubljana! Dum la tuta nokto ni ĉirkaŭvagadis sur fla-

nkaj vojetoj, tiel ke nur je la 6a matene ni alvenis en nia hotelo. Ni tamen ripozis sur nia lito ĝis la 10a h. Tiam ni matenmanĝis kaj interparolis kun kelkaj lokaj gesamideanoj. Unu de ili disdonis poemkolekton sian senpage kaj kolektis monon por la viktimoj de Skoplje. Poste komenciĝis la longega vojo ĝis Beograd. Pro malfruiĝo ni ne povis viziti Zagreb. Malgraŭ ke ni vidis preskaŭ neniun aŭtomobilon sur tiu larĝa vojo, ni tamen vidis mortakcidenton! Ni alvenis en Beograd... tro malfrue por viziti la urbon. Sed la vespero en la hotelo estis tre agrablighata de lokaj gesamideanoj. S-ino Subotić transdonis al S-ro Roose memorflaĝeton por la grupo «Paco kaj Justeco» de Brugge kaj alia juna samideano donis al li persone du belegajn pupojn en nacia vestaĵo. Sabaton la 3an de aŭg. ni devis atingi Sofion. Ĉio iris bone ĝis Niŝ. La pejzaĝo kun la multaj sunfloroj kaj ŝaftrupoj kaj gardistoj similis al en la Biblio priskribitaj regionoj. Sed LA mizerego komenciĝis je distanco de ankoraŭ 85 Km de la landlimo. La vojo devis esti riparata. Anstataŭ ol fari tion per partoj de 3,4 Km., la tuta vojo estis frakasita! Stonoj, montetoj de sablo, ktp. kuŝis ĉie. Preni alian vojon? Sajne tiu estis la sola vojo. Sur tia malebenajo nia kompatinda aŭtobuso devis veturi je rapideco de ĉirkaŭ 5 Km. po horo, kaj kun la risko ke ĉiumomente io povis rompiĝi! Ofte eĉ tiel ne plu estis eble daŭrigi, kaj tiam ni tutsimple devis traveturi la kamparon. Imagu! Ne mirinde ke estis post noktomezo kiam ni alvenis en Sofio (feliĉe, sen akcidento; kiel eble??). Nu, ni esperis ke finfine ni havos nun ripozon en bona hotelo. Se vi pensas tion! La afero de la loĝado estis efektive en ordo por nur kelkaj inter ni. De la aliaj la hotelo ne posedis la kopion de la mendiloj kaj do ne povis gastigi nin. Tiel, en la nokto, ni vagadis de unu hotelo al alia! La subskribanto fine povis enlitiĝi je la 5a matene! Kaj je la 10a ni devis esti en la Universiada por la solena malfermo. Mi ne longe priskribos kion mi ankoraŭ spertis rilate tiujn hotelojn. Sufiĉas diri ke la postan tagon la hotelservo metis alian Bulgaran esperantiston en mian ĉambron (post noktomezo); kaj personon kiun mi ne konis!) kaj la postan tagon, du junajn Polojn, ne-esperantistojn! Kaj la trian

tagon, malgraŭ promeso ke mi havus ĉambron, mi estis forjetata el la hotelo !! Je la vespero de la 4a tago, la afero estis fine en ordo. Mi havas bonegan kaj agrablegan memoron !

Ni ne rakontos la restadon de la karavanoj en Sofio, dum la kongreso. Ĉu kelkaj diskrete, suspekteme, time-me (?) evitis min ? La karavano mem vizitis Plovdiv (la antikva Philippopolis) kaj la Vituŝamontaron kaj la Rilamonahedon (kie ni ricevis « luksan » mangajon » ĉar ni estis pagintaj pli ; bedaŭrinde tiu « luksa » mangajo entenis preskaŭ nenion por mangi !)

Ni vizitis enkaŭ la antikvan Turkan fortikajan urbon Tirmov kie pluvego aliformigis la stratojn en torentoj, kaj kie nia aŭtobuso estis je iu momento premita inter telefonfosto kaj sablomonteto. Estas nun ankoraŭ enigmo al mi kiel la ŝoforo kapablis elsaviĝi ; verŝajne li mem ne scias ! Sabaton la 10an ni forvojaĝis al Rumanujo. Ni foriris antaŭ la solena malfermo por certe entempe alveni en Bukareŝti, ĉar ni nepre volis viziti tiun ĉefurbon. Sed ankoraŭ tio iĝis fiasko. Precipe kulpas la doganoj kie ni ĉiufoje dum almenaŭ du horoj devis atendi. De la landlimo, kie ni transiris la faman ponton de « amikeco » super la Danubo inter Bulgarujo kaj Rumanujo, kaj kiu estas fortege militiste gardata, ni havis oficialan gvidantinon, junan Rumanan studentinon kiu bedaŭrinde ne konis esperanton, sed kiu bone konis sjan metion. Ni trairis la petrolregionon de Ploesti. S-ro Ockey tradukis la anglalingvan klarigon en esperanto. Ni bone memoras tion. En la Rumana urbo Sinaia ni vidis tipan enterigon. La funebra procesio montris la ĉerkon malfermita ! Mi kredas ke estis en Cluj ke matene ni ne havis akvon por lavi nin kaj ke post la matenmango estis ree akvo. Tion ni konstatis ĉar ĝi fluis en torento laŭlonge de ŝtuparoj, en la lifto ktp. Tion por pruvi ke

**G. FAES**  
Eiermarkt, 21  
**ANTVERPENO**  
★ Por via **MUZIKO**  
**RADIO** kaj **GRAMOFONO**

estis en la vojaĝo ankaŭ gajaj momentoj. por ni !

En Budapeŝto ni restis tutan tagon. Tiu urbo jam aspektas multe pli okcidenta ol la antaŭaj. La vespero en la citadelo estis tre amuza kaj pitoreska. Je la dogano de Ĉeĥoslovakujo ni devis resti pli ol ses horojn ! pro malgrava formalajo kiu ne estis en ordo ! Ankaŭ en Prago ni restis tutan tagon. Alia pika, tikla afero kiun ni spertis estis ĉe la elirejo de Ĉeĥoslovakujo kie ni volis ankoraŭ aĉeti kelkajn aferojn. La butikisto tie ne akceptis ĉehan monon (en Ĉeĥoslovakujo !) ; la monŝanĝa oficejo same ne akceptis la enlandan monon ! kaj la leĝo malpermesas elporti ĉehan monon el la lando !!

Mi ne rerakontos detalojn kiujn mi jam menciis en antaŭa numero de « Sonorilo ».

Entute la vojaĝo estis belega, unika ! Tion ni ŝuldas al la persista laborego de S-ro Gr. Maertens. La karavananoj admiris lian senĉesan laboradon dum la tuta vojaĝo. Sed mi scias ke li laboris tiel dum la tuta antaŭa jaro. Jes ni jam tre multe ŝuldas al esperanto... kaj al kelkaj esperantistoj.

Unu kiu partoprenis.


**KOTIZTABELO POR IZOLULO**

Bonfara membro	150 F
Membro (kun abono)	100 F
Familia membr(in)o	50 F
Junuloj (18 ĝis 21-jara)	50 F
Kadeto (ĝis 18-jara)	25 F
Abonoj	80 F

Eventuale aldonu la UEA-kotizon poŝtkonto B.E.F. N° 163434 Raapstraat, 72, Gento

**KRUCVORTENIGMO 6**

**DIFINOJ :**



**Horizontale :**

- 1) nepre ekzakta.
- 2) poemo - ne pli ol.
- 3) satelit' - du konsonantoj de horizontale 2 II - persona pronomo.
- 4) kara malgranda persono - verba finaj'
- 5) Afrika rivereg' - flor' - mal-longilo por voja distanco.
- 6) virinfana - foje.
- 7) spegula bildo de : « iu objekto » - malgranda pec' da teksto.
- 8) ekzistas nur unu en Esp. - artefarita hom'.
- 9) prepozicio - prefikso.
- 10) Iu kiu kompensas perdojn.

**Vertikale :**

- 1) Malgajeca.
- 2) el malpeza metalo.
- 3) kiu koncernas enmanigeblan parton de objekto - prepozicio.
- 4) sufikso - provizora konstruaj'.
- 5) neorganika substanco.
- 6) ĉefa arterio - Hispan'.
- 7) densigita oksigeno.
- 8) malviro - manĝebla radik'.
- 9) laŭ maniero de dom - aŭ ĉasbesto - sufikso.
- 10) scienco pri nombroj.

N.B. 1) La apostrofo (') post difino, aŭ post iu vorto de la difino, montras ke nur la radiko estas enskribota, do sen finajo.

- 2) La solvo aperos en la sekvonta numero, kun mencio de la solvintoj, inter kiuj libropremio estos ellotata.
- 3) Sendu NEPRE vian solvon al : Ch. Poupeye, Elf Julistraat, 11, Bruĝo, dum la 10 unuaj tagoj post la apero.

**SOLVO DE LA PROBLEMO N° 5**

Inter la diversaj ensendajoj, dekunu seneraraj de : S-ino J. De Hondt, Antverpeno; Sro J.R. Van Eynde, Antverpeno; Sro De Smedt Petro, St Gillis-Dendermonde; Sro R. Iscrentant, Bruĝo; F-ino M. Willems, Bruĝo; Sro J.A. Rousseau, Parizo; Sro M. Lemme, Lieĝo; F-ino E. De Coene, Ekeren; F-ino E. Ernst, Bruselo; Sro A. Vande Velde, Gento; Sro J. Eeman, Assebroek. Lotumado (dum kunveno B.G.E. 20.8.63) aljuĝis la libropremion al Sro M. Lemme, Lieĝo.

**A U T O M O B I L O**  
**V - E F I K - D I R**  
**E N L I T I G I - T**  
**N - E C O - E O L O**  
**T - V I L - N I - G**  
**I D O - I T - M U F**  
**U - I R O N I I - R**  
**R I D E G O - S I A**  
**S E - A - E K - - I**  
**T E R M O M E T R O**



# GRUPA VIVADO

## ANTVERPENO

**Esperanto-Grupo «La Verda Stelo»**  
Poŝtĉeknumero: 726.54

La 23an de aŭgusto S-ro R. Van Eynde detale kaj laŭ amuza maniero raportis pri sia libertempo en la Ardenoj kaj S-ro J. Verstraeten kompletigis la vesperon per gaja prelego el libro de R. Schwarz «Prozo Ridetanta».

La 30an temis pri «Raportoj de la 48a U.E.K. en Sofio. Precipe S-ro I. Durwael, kiu por la unua fojo ĉeestis universalan kongreson, emociplene kaj entuziasme raportis pri siaj travivaĵoj kaj personaj impresoj, — impresoj kiuj cetere memorigis kaj ĝojigis precipe la malnovajn gemembrojn pri ilia sprita skizo de sia aventurplena restado en Sofio. S-ro J. Lernout, pro la jam malfrua horo, proponis prokrasti sian kontribuon al unu el la sekvontaj kunvenoj.

La 6an de septembro S-ro R. Van Eynde prezentis 4 kolor-dokumentfilmojn pri la provinco de Antverpeno. Unu filmo estis en Esperanto; S-ro H. Vermuylen faris la tradukon dum S-ro J. Verstraeten diris la tekston. S-roj J. Montmirail kaj J. Van Eynde flegis la aparataron. Bela vespero kun bona programo kiun oni klopodas daŭrigi dum sekvontaj vesperoj.

La 13an por enkonduki la vintran sezonon la Prez. S-ro M. Jaumotte paroladis pri sia vojaĝo en Italujo. Li kunportis amason da ilustritaj kolorpoŝtkartoj per kiuj li kreis la italan sferon en kiu li kaj lia edzino vivis dum 3 semajnoj. Lia granda kapableco observi la plej diversajn okazintaĵojn kune kun lia vigla spirito kaj humoreplena vizio sur la lando kaj popolo vekis la streĉan atenton de la ĉeestantoj dum la plena daŭro de la parolado. S-ro L. De Marré elparolis la tradiciajn sed tamen tre sincerajn dankvortojn kaj la aŭdintaro konkludis la tuton per varma aplaŭdo.

Dimanĉon, la 15an matene je la 8a h. en nebula sfero startis la tutaga surpriza ekskurso organizita de S-ro R. Van Eynde. Neniu krom la organizanto sciis la celon de la vojaĝo. En Haselt oni matenmanĝis kaj finfine alve-

nis en la regiono de la «Voer». Tagmango en Visé kaj posttagmeze vizito de la «Turo de la Paco», — impona turo konstruata de valona samideano - mondciivitano, konstruata per la ŝtonoj trovitaj surloke. Oni ankaŭ vizitis la subterajn fungo-kamponojn de Canne kie oni profitis la okazon gustumi la tieajn fungojn preparitajn diversmode. Je deca horo oni revenis en Antverpeno. La tuta ekskurso plene sukcesis dank'al la lerta gvidado de S-ro R. Van Eynde. De la unua minuto ĝis la lasta li klarigis kaj komentis la vidindaĵojn dumvoje, rakontis mil kaj unu sciindaĵojn pri la regionoj kiujn oni preterpasis kaj zorgis por bona gvidanto en la grotjoj de Canne. Konskvence li tute meritis la korajn dankvortojn de la Prez. S-ro Jaumotte kune kun la vigla aplaŭdo de la ekskursantoj.

Lundon, la 16an en la lernejo de Belgiĉi 26 gelernantoj enskribigis per la elementa kurso. S-ro Luc De Marré gvidas tiun kurson kiun S-ro M. Jaumotte enkondukis laŭ sia sprita maniero.

La 20an ankoraŭ ĉiam en la kadro de la U.K. en Sofio F-ino A. Enzlin prezentis sian kolorfilmon memvorkitan kaj kiun ŝi enkondukis kaj komentis. Ĝi ne nur pritraktis la kongresurbon sed ankaŭ ĉiujn vidindaĵojn dumvoje al kaj for de Bulgarujo. Malgranda aldono pri la Mehlena Kavalkado de la Skta Virgulino de Hanswijk vekigis longan aplaŭdon. Kaj F-ino Bl. Geers daŭrigis la rakonton de siaj aventuroj dum sia restado en Sofio kaj reveno al Belgujo.

Dimanĉon, la 22an 20 verdstelanoj vizitis la «Maagdenhuis»-muzeo en la Lange Gasthuisstraat, organizita de S-ro R. Van Eynde. La vizito dum dimanĉo estas nur escepta; sed dank'al la organizanto oni akiris tiun permeson. La vizito mem estis ege interesa precipe pro la persona gvidado de la arkivistino, S-ino Pais Minne. Je foresto de la Prez. S-ro Luc De Marré, Vic-prez., elparolis la dankvortojn.

La 27an ekzakte je la datreveno de sia naskiĝo S-ro Van Riet, nederlanda samideano, 80-jara kaj loĝanta en Antverpeno, paroladis pri sia Esp-vivo.

La 4an de oktobro S-ro J. Lernout, kiu ankaŭ vojaĝis al Sofio por la U.E.K., kaptis tiun okazon por viziti samtempe Turkujon. Estis pri tiu lando ke li precipe paroladis kaj montris lumbildojn kaj diapozitivajn. Lia historia enkonduko pri la turka popolo estis tre detala kaj kiel arkitekto li tutspeciale atentigis pri la diversaj konstru-stiloj kaj ornamaĵoj en la preĝejoj.

La 11an fakte estis festa kunsido ĉar en «La Coupe glacée», Koningin Astridplaco, mitulvespermanĝo estis organizata al kiu preskaŭ 30 verdstelanoj pretis sian kunlaboron.

## Esperanto — Ekspozicio en Berchem

Dum la semajnfino de la 7a kaj 8a de oktobro E.K.I.-Antverpeno denove organizis Esperanto-ekspozicion en Berchem, Grote steenweg en la aŭtomobilejo Caremans. Ĝi estis solene malfermata de S-ro Ryckaerts, skabeno de al Publika Instruado en Berchem. Li faris rimarkindan paroladeton en kiu li esprimis sian admiron por la internacia lingvo, miris pro la amasoda publikajoj plej diversaj kiuj jam aperis kaj preskaŭ riproĉis al la esperantistaro esti tiel humilaj kaj «senbrujaj» ke la movado fakte restas en la ombro. S-ro Jaumotte, kiel Prez. de EKI, respondis laŭ sprita/amuza maniero kaj poste rondirigis la invititojn, inter kiuj diversaj ĵurnalistoj. La ekspozicio havis kontentigan sukceson.

## BRUGO

### Bruĝa Grupo Esperantista, Reĝa Societo (Poŝtĉekkonto N° 4835.33)

La ĉiujardaj kunvenoj daŭrigis dum la somera periodo kaj entenis lecionon kaj kunsidon, laŭ jena konciza raporto: 11an de junio: konkurso pri eraraj desegnaĵoj. Sabaton, 15an: sesopa delegacio de la grupo ĉeestis la inaŭguron de la avenuo Dro. Zamenhof en Anderlecht. La 18an: S-ro. Eneman reproduktis per magnetofono esp.-elsendojn el la Radio-Varsovio. 25an: Esp. kartludado.

La kunveno de la 2a de julio estis anstataŭata per promenado al Gruuthuse Parko, kie okazis koncerto. 9an, 16an kaj 23an: Esp. kartludado. Komitata kunveno okazis vendredon 12an.

Lasta leciono de la elementa kurso estis donata la 30an de julio. La prez., S-ro Ch. Poupeye, dankis la kursgvidanton, Sron Eneman, kaj lernanto, S-ro Van Stechelman, antaŭlegis el pro-

praj verkajoj. Pro libertempo ne okazis kunvenoj la 6an kaj 13an de aŭgusto. La ĉiusemajnaj kunvenoj rekomencigis la 20an, kun ekzameno pri elementa kapableco, en kiu S-ro. Van Stechelman brile sukcesis per 91 poentoj sur 100. 27an: Esp. kartludado.

3an de septembro: Interparolado. 10an: Interesa konkurso sub gvidado de S-ro Demeulenaere. 17an kaj 24an: Esp. kartludado.

1-an de oktobro: nova elementa kurso sub gvidado de S-ro J. Eneman, kiu aplikas novan metodon de li prilaboritan. Kelkaj novaj lernantoj. Post la leciono: portretludado. La kurso daŭrigas dum la unua horo de ĉiu kunveno. Dum la dua horo: la 8an: raportado pri la administrantara kunsido BEF Bruselo 6/10 kaj pri la kunveno de BEJA; la 15-an: interparolado. La 22an: komentariado de la oficiala raporto pri la BEF-kunveno de la 6a.

En la Mezgrada Statlernejo de St-Kruis, S-ro Eneman rekomencis sian posthoran kurson por multaj junaj lernantoj.

**Programo por estontaj kunvenoj:**  
Kunveno ĉiuarde, je la 20a, en «Strijdershuis», Hallestraat, N° 14. Tel. N° 347.98. Dum la unua horo: leciono de la elementa kurso, ankaŭ rekomendata al pli malnovaj gemembroj; dum la dua horo.

DECEMBRO: 3an: Sta. Nikolao-festo. Ĉiu alportu nekonatan premion. 10an: Parolata gazeto. 17an: Impresoj pri Lugano kaj ĉirkaŭaĵoj, kun kolordiapozitivaj. S-ro Ch. Poupeye. La 24an kaj la 31an: ne okazos kunveno.

JANUARO: 7an: Festo de la tri Reĝoj.

### Familia Kroniko.

Kondolencoj al S-ro D. Demeulenaere, vicprez.-kasisto BEG, al S-ino Demeulenaere-Verstrynghe, kaj al iliaj gefiloj Anneke kaj Rik, ĉiuj membroj BEG, pro la morto de ĵusnaskita filito kaj frateto: Geert 24.10.63.

Gratuloj al S-ro. Stevens Werner, membro BGE, kiu edzigis kun F-ino Gina Demey (30.10.63).

### «Paco kaj Justeco» BRUGGE

En la pasintaj monatoj ni havis la kutimajn ekzercojn (por supera kapableco) donitajn de R. Martens laŭ lia ĉiama originala kaj amuziga maniero. Ni havis ankaŭ cerbogramnastikojn; unu de R. Myny. La 13an de junio ni aŭdigis kaj komentaris la sonbendon pri la debato inter S-ro M. Jaumotte



Maurice Jaumotte, ĝenerala prezidanto de BEF, inter la diplomitoj de la Lieĝa Grupo Esperantista, dum ceremonio okazinta la 26-an de Septembro 1963. Kliŝo de ĵurnalo « La Meuse »

kaj S-ro A. Alfandari. Ni admiris la klokventecon de nia prezidanto kaj fakte antaŭe jam sciis ke s-ro Alfandari estus la perdanto en tiu afero. Cetere ni jam estis pristudintaj Neon helpe de la luksa eldono de Brepols pri tiu nova(?) lingvo. En la someraj monatoj ni ne multe kunvenis. Ja, multaj gemembroj estis for! Nia grupa prezidanto iris al la Kulturcentro Grésillon, kun la tuta familio, kaj donis tie kvar konferencojn. Li ankaŭ partoprenis la karavanon al la suno t.e. al Sofio, kiun organizis vicprez. Gr. Maertens. La raportoj pri tiuj vojaĝoj kaj esperanto-eventoj plenigis plurajn grup-vesperojn en septembro; despli ĉar ambaŭ alportis ilustraĵojn, kaj tiam precipe S-ro Maertens kiu faris grandegan nombron da diapositivoj. Inter-tempe li prezentis ilin ankaŭ en aliaj grupoj. Komence de oktobro niaj prez. kaj vicprez. iris al Aalst kie ili paroladis kaj gvidis debatvesperon antaŭ studenta grupo. Tiu vespero iĝis tre interesa. En nia propra grupo ni havis ankaŭ debaton pri la temo: ĉu ekzistas interesiĝo pri la mondlingva problemo ĝenerale kaj pri esperanto speciale. La konkludo — en kontraŭo kun tio kion verŝajne multaj pensas pro malsukceso de multaj lokaj publikaj kursoj — estis ke vere ekzistas sufiĉe granda interesiĝo. Tion multaj inter ni spertis. En sekvonta debato ni nun priserĉos la kaŭzojn de tiuj publikaj malsukcesoj.

Dum la pasinta somero ni ne ofte Volley-Ball-ludis pro la daŭra malbona vetero. La vintraj ekzercoj jam komenĝis denove en « Ter Groene

Poorte », ĉiun vendredan vesperon de 20.30 ĝis 22.30 h. Ankaŭ ni komencis la kontaktojn kun la Beograda grupo kiu tiel afable akceptis niajn prezid. kaj vicprez. en Beograd; kaj ni nun atendas respondon. Se UEA ankaŭ demandos helpon de nia grupo en formo de ĝemeligo kun iu Afrika aŭ Azia grupo, ni estas pretaj.

Jaŭdo la 17a de okt. estis eksterordinara vespero. Tiam nia membro-artisto André Symoens prezentis al ni sian novan programon kiun li ankaŭ prezentos publike en la teatro « De Korrekelder », fine de novembro. Li alportas mesaĝon en rilato kun la Flandra « Chanson »: li volas pliriĉigi ĝin laŭ enhavo. En tio li plene sukcesis.

#### CHARLEROI


Karloreĝa Grupo Esperantista  
66, St. Vandervelde, Marchiennes

SEPTEMBRO. — La 26an okazis la unua kunveno de la nova sezono, kiu rekunigis la fidelajn membrojn. Post iom da ĝenerala babilado, nia sekretario (ankoraŭ multe pli babilema ol antaŭe) volis nepre montri kaj komenti al la aliaj 50 kolor-diapositivojn faritajn en Sofio mem.

La sekvantan tagon rekomenciĝis la E-kurso, en la lernejo de la Digue; 5 lernantoj enskribiĝis.

OKTOBRO. — Nia multestimata profesoro Delforge parolis al ni pri « La digesta aparato » dum la kunveno de la 10a. Antaŭ niaj okuloj teruritaj, li distrancis homon... el gipso.

Dum la semajnfino de la 19a kaj 20a, kelkaj membroj reprezentas nian grupon al la Trilanda Renkontiĝo en Maastricht.



## BELĜA ESPERANTO-FEDERACIO

46-a kongreso en LIEĜO (WÉGIMONT)

16-, 17- kaj 18-an de majo 1964

Adreso por korespondado :  
D-ro P. Denoël, 20 rue Victor Raskin, Lieĝo.

### ALIĜILO

Mi aliĝas al la kongreso de Lieĝo kaj laŭ la suba specifo sendas la pagon kune kun la aliĝilo (Poŝtĉeko N° 7397.70 de Dela Denoël, 20 rue Victor Raskin, Lieĝo) :

	Nombro	Sumo
Kotizo(j) . . . . .	.....	.....
Cambro(j) 2-persona . . . . .	.....	.....
1-persona . . . . .	.....	.....
Komuna dormejo . . . . .	.....	.....
Bankedo(j) . . . . .	.....	.....
Lunda ekskurso . . . . .	.....	.....

Entute .....

Familia nomo, S-ro, S-ino, F-ino (nepre forstreku du) .....

Antaŭnomo : .....

Strato kaj numero : .....

Urbo kaj provinco (eventuale lando) : .....

Nomo kaj antaŭnomo de la akompananta(j) familiano(j) : .....

Data de tiu-ĉi aliĝilo : .....

Subskribo : .....

SE VI PAROLAS PRI STROVI... VI PENSAS PRI  
VIANDAĴEJO. SE VI PENSAS PRI VIANDAĴEJO... VI  
AĈETAS ĈE

## STROVI

Vlamingstraat, 48 BRUGGE

STROVI . Varoj :

GARANTIO pri

bona kvalito

kaj bona prizorgado

Telefono : pogranda komerco 34559

detala " 33408

STROVI estas unuaranga!



- ★ POR VIAJ EKSTERLANDAJ  
transpagoj
- ★ POR ŝanĝoj en la plej alta  
kurzo
- ★ POR VOJAĜDEVIZOJ

Bank van Roeselare & Westvlaanderen

Sidejo : ROESELARE

Noordstraat, 38 Belgujo

38 Agentejoj kaj oficejoj en la tuta provinco de Okcidentflandrujo.

manufakturaĵo firma DE BROUWERE

Magdalenastraat, 29, Kortrijk (Belgujo) - Tel. (056) 216 54



## VIRINAJ BLUZOJ KAJ JUPOJ " MAGDELEINE "

deponita kvalitmarko

la perfekta konfekcio

fabrikita el plej bonaj svisaj teksaĵoj

Haveblaj en la bonaj konfekcibutikoj



### PRECIPAJ CENTROJ :

Antwerpen	: Aalmoezenierstr. 2
	Abdijsstr. 57
	Anselmostr. 17
	Nationalestr. 87
Arlon	: Marché-aux-Légumes 16
Brugge	: Breidelstr. 8
Brussel	: Galerie d'Ixelles 9
	Anspachlaan 194
Eupen	: Kirchstr. 14
Gent	: Brabantdam 25
Herstal	: Rue Large Voie 4
Leuven	: Bondgenotenlaan 29
Luxembourg	: Place de la Gare 67
Mechelen	: Grootbrug 8
Roeselare	: Ooststr. 124
Tournai	: Rue Royale 75
Turnhout	: Herentalsstr. 6
Verviers	: Pont St. Laurent 2